



PENSEO

N-ro 116

Jun./2001

**Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.crosswinds.net/~zfmao/penseo

Dio Donis al Li' Nur Uhu Muson

Tang Qiantian

Antaŭ multaj jaroj, estis obskura junulo en senfama urbeto de Usono. Li posedis nenion krom kapablo de pentrado kaj kapoplano da idealoj.

Kiam li atingis la aĝon de 18 jaroj, laŭleĝe liaj gepatroj jam plenumis sian devon nutri la filon. Lia patro, unu tagon post lia naskiĝtago de 18 jaroj, anoncis al li, "Filo mia, Ĉar vi jam plenkreskis, vi



mem devis preni vian postan vojon. Memoru. Dio donas al neniuj multe da ŝancoj. Bonvole disponu bone la ŝancon apartenantan al vi!"

Aŭdinte tion, li komencis aranĝi sian pakaĵon silente. Sub la karesa kaj zorgema rigardo de liaj gepatroj, li senhezite forlasis sian familion kaj vojaĝis al Kansasurbo por vivteni. Komence li venis al ĵurnalejo por peti oficon. Li pensis, ke en ĝi regas bona etoso por arto, guste kiun li bezonas. Sed li neniel imagis, ke, la ĉefredaktoro, post pririgardado de lia pentra manuskripto, deklaris al li tre ĝentile, "Via pentraĵo montras nematurecon kaj kreiveco mankas al ĝi.", kaj konsilis al li, ke li revenu por la tiea laboro post kelkajara diligenta ekzercado. Tio malesperigis kaj senkuraĝigis lin gis la ekstremo. Kiel aliaj junuloj, kiuj elhakis sian vojon en la ekstera mondo, li spertis la unuan fojon la guston de malsukceso.

Post kelkfoja rifuzado al laborposteno, li fine trovis laboron kun malmulta honorario – pentri por preĝejo. Pro manko de mono, li devigite luis neuzitan remizon, anstataŭ studion, kiel sian portempan oficejon. Ĉiutage li prelaboris diligente ĝis la profunda nokto en la remizo plena je benzina odoro.

Des pli teda estis, ke ĉiufoje kiam li enlitiĝis, unu muso ĉiam pepante elrampis, saltadis kaj serĉis panpecetojn sur la planko, kiujn li faligis dum manĝado. Tion li devis toleri, por ke li havu sufiĉan energion en laboro. Eble pro troa laceco, li povis ronke endormiĝi, tuj kiam li enlitiĝis. Tiamaniere, la eta muso kunvivis harmonie kun li longan tempon.

Iutage, okazis, ke kiam la laca junulo levis sian kapon el de la pentrotabulo por moderigi siajn iom acidiĝantajn okulojn, li vidis en la malhela lamplumo paron da glimbrilaj okuletoj, jen de la muso! Se, antaŭ kelkaj jaroj, li povus elpensi diverspecajn rimedojn por mortigi la muson, li tamen ne volis tion fari. Ĉu morta muso estas pli amuza ol la viva? Soleco kaj mizero naskigis simpatian en li. Ridetante li fikse rigardis la etan spritan estaĵon, sed ĝi fulme forkuris. Aŭskultante la venthurlon ekster la fenestro kaj diversajn sonojn de la naturo, li sentis sin ne soleca. Kiel ajn dirite, li kunvivis kun la muso kiel najbaroj, kaj ĝi frekventis kiel hontema knabineto.

Ververe la muso aperis fojon post fojon, ne nur en noktoj. La junulo neniam ĝin vundis, kaj eĉ ne eligis siblan soneton por ĝin timigi. La muso, siaparte, faris diversajn movojn kaj ludis akrobataĵojn, dum kiel la ununura spektanto, li donis iom da paneroj por ĝin kuraĝigi. Iom post iom ili komencis konfidi unu la alian kaj starigis amikecon. Komence ĝi tenis malproksimiĝon de li, kaj certigante, ke li ne volas vundi ĝin, ĝi movis proksime grade. Kaj fine ĝi aŭdace surrampis la pentrotabulon kaj dancis ritme sur ĝi. Dume, sen forpeli ĝin, li silente ĝuis la aktivecon de la eta vivo.

Post nelonge, la junulo forlasis Kansasurbon. Pere de alies prezentado, li iris al Holivudo por fari desegnaĵojn por animala karikaturo filmo. Tio certe estis tre malfacile akirebla ŝanco por li, sed malfeliĉe, li malsukcesis ankoraŭfoje. Pro tio li fariĝis senlabora

kaj sengroŝa.

Sendorme li meditis en al mallumaj noktoj. Li eĉ dubis, ĉu li vere kapablas pentri kaj indas ian valoron. Finfine, en sia abisma malriĉeco, ununokte li abrupte ekpensis pri la muso en la garaĝo de Kansasurbo, kiu surrampis la pentrotabulon kaj saltadis tien kaj reen. Inspiro fulmis brile tra lia menso dum tiu malluma nokto. Li rapide ellitiĝis, ŝaltis la lampon, starigis pentrobreton kaj finskizis la musan konturon dum mallonga momento. Historie, ordinare naskiĝis tiel la plej granda figuro de animala karikaturo – Mickey Muso.

La juna pentristo estis unu el la plej reputaciaj personoj en Usono – s-ro Walter Disney. Li kreis Micky Muson, kies famo kuris tra la mondo. Neniu povas imagi, ke museto vivinta en la garaĝo plena je benzinaodoro fariĝis la prapatro de la plej fama karikaturfilmulo. Kien ajn Mickey Muso iras, ĝi eĉ rikoltas pli multe da populareco ol film-steluloj, kio vastigas la famon de Walter Disney tra la tuta globo.

Fakte, Dio donas al neniu multe. Li donis al Walter Disney nur unu museton.

elĉinigi **Wei Da**



EL «LAŬZI»

ĈAPITRO 23

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi pritraktas la principon de sia Taŭo kaj la manieron ĝin posedi. Se oni kredas je ĝi, oni ĝin akiras. Se ne, oni ĝin perdas. Li ankaŭ emfazas la gravecon de fido, kiam li finas tiun ĉi ĉapitron, dirante: “Nur kiam la reganto ne havas sufiĉan fidecon, la popolo lin ne fidis.”)

Diri malmulton estas laŭ la Naturo.

La ventego ne daŭras unu tutan matenon,

Nek la pluvego daŭras unu tutan tagon.

Kiu do faras ilin tiaj?

La Ĉielo kaj la Tero.

Se la forto eĉ de la Ĉielo kaj la Tero ne povas longe daŭri,

Kiel do povus tiele daŭri tiu de la homo?

Tial tiu, kiu sin tenas je la Taŭo, identiĝas kun la Taŭo;

Tiu, kiu sin tenas je la Virto, identiĝas kun la Virto¹;

Tiu, kiu sin pretigas al la perdo de ili, identiĝas kun la perdo.

Tiu, kiu identiĝas kun la Taŭo,

Estas volonte akceptata de la Taŭo;

Tiu, kiu identiĝas kun la Virto,

Estas volonte akceptata de la Virto;

Tiu, kiu identiĝas kun la perdo,

Estas volonte akceptata de la perdo.

Nur kiam la reganto ne havas sufiĉan fidecon,

La popolo lin ne fidas.

¹ Ĉi tie kuŝas sencotumo: en la antikva ĉina lingvo “De” povas signifi samtempe “akiron” aŭ “ricevon” kaj “virton”.

ĈAPITRO 24

(En tiu ĉi ĉapitro aperas dialektikaj vidpunktoj en la filozofio de Laŭzi, kaj lia ideo, ke oni devas retiriĝi por antaŭeniri, plu montriĝas ĉi tie. Laŭzi opinias, ke la ideo estas konforma al la principo de la Taŭo.)

Kiu, kiu leviĝas sur la piedfingroj, ne firme staras;

Tiu, kiu faras tro grandajn paŝojn, ne iras longan vojon;

Tiu, kiu estas elmontriĝema, ne havas gloron brilan;

Tiu, kiu konsideras sin ĉiam prava, ne estas prudenta;

Tiu, kiu fanfaronas, ne estas merita;

Tiu, kiu fieras pri si mem, ne estas eminenta.

Juĝate laŭ la Taŭo,

Tiaj agmanieroj estas nenio alia ol manĝrestaĵoj aŭ verukoj,

Kiujn ĉiu abomenas.

Tial la homo, kiu posedas la Taŭon, ilin evitas.

Tradukita de **Wang Congfang**



Hejmsopiro

Li Bai

Ĉelite ludas lunobrilon,

Jen kiel prujna terkovrilo.

Mi, rigardante l' lunon helan,

Hejmsopiras sen trankvilo.

elĉinigi **Vejdo**

Morgaŭ, Ne

Bei Dao

Tio ne estas adiaŭ'
ĉar ni ne renkontiĝis
kvankam ombr' kaj ombr'
interkovriĝis sur la voj'
kvazaŭ soleca eskapant'

Morgaŭ, ne
morgaŭ ne transas la nokton
tiu atendas, kiu pekas
rakonto okazinta nokte
finiĝu en la nokt'



elĉinigis Yao Mei

Silenta Sento

Wang Guozhen

Ekzistas ĉiam tiaj kazoj
ĝuste por amafero
mi min kaŝas
sed kaŝiteblas nur la korpo
nekaŝebla tamen estas la
silenta sento

Vagado en lunlumo
en sonĝo hezitado
komplikoj sentaj
tre ofte
ne konas vortojn

Ne ĉar mi ne sopiras amon
ne ĉar mi ne konkeras amon
mi nur timas
ke am'mem formus vundon




elĉinigis He Ye

fluganta Araneo

Zhang Yuanhao

Iun vesperon, mi trovis, ke nigra araneo estis
streĉinta larĝan araneaĵon inter du tegmentorandoj en
la malantaŭa korto.

Ĉu la araneo kapablas flugi? Se ne, kiamaniere li
sukcesis tiri la unuan fadenon de unu tegmentorando
al la alia, kovrante pli ol tri metrojn? Kun dubo pri tio,



mi kirle detruis ĉiujn araneaĵojn en la korto.

Post zorgema observado, mi trovis, ke li iris
malrektan vojon: li alnajlis la ekstremon de sia muka
fadeno al unu tegmentorando, malsupren grimpis laŭ
la muro, rampis kun levita vosto paŝon post paŝo tiel
singarde ke li ne lasu la fadenon gluiĝi al la sableroj
aŭ ŝtonetoj aŭ aliaj aĵoj sur la malplena tero, kaj
supregrimis la kontraŭan tegmentorando ĝis kiam li
atingis la konvenan altecon, kiu kontentigis lin, li
streĉis la fadenon. Tia proceso kostis al li pli ol
duonhoro. Kaj la posta progreso estis pli rapida ol
tirado de la unua fadeno. Kvankam la teksado ŝajnis
tre komplika, li laboris tre lerte, kvazaŭ li farus
amuzan prezentadon.

Li ne kapablas flugi, sed li povas teksti sian neton
en la aero. Kiel laborema, sensitiva, silentema kaj
persista insekto, li elfaris fajnan kaj belan okangulan
neton streĉitan kiel dian kreaĵon.

Lia sukceso rememorigas tiujn saĝulojn, kiuj
aspektas silentemaj kaj nemalkaŝemaj. El tio, mi tenas
la fakton en la koro: kvankam la araneo ne kapablas
flugi, li tamen povas teksti sian neton en la aero.
Mirakloj estas faritaj de la persistemuloj.

elĉinigis Fan Ren



Tri Poemoj de Du Fu



Malĝojemulo ĉe la Riverbordo

Sensone olda sovaĝul' el Shaoling*
larmojn glutas,
Sekrete iras al Rivero Kurba
primavere.

Envide mil ŝlositaj palac-pordoj jen sin trudas,
Por kies ĝu' ĉeborda salikaro verdas vere ?
Iame l' reĝaj flagoj al Sudkorto pave venis,
Aspektis ĉio ena tiel kolore jen beleta.
Unua Sinjorino el Palaco Zhaoyang prenis
Sidlokon en l' imperiestra ĉaro servopreta.
Sagistoj inaj antaŭ l' ĉaro rajdis kun fiero
Sur la ĉevaloj blankaj kun orita bridrimeno.
Sagstino levis kapon, sendis sagon al l' aero,
Du birdoj falis de l' ĉielo pro vundsveno.
Kie tiuj brilaj okulpar' kaj dentoj nun forvagas?
Fantom' sangmakulita** vagabondas sen reveno .
Ĉiame Wei fluas, Jianguo-vojoj ja zigzagis,
Ne plu l' mortinto kaj vivan' mesaĝis kun kompreno.
Per larmoj homoj ĉiam en la kor' sopiron kovas,
Kiel floroj, herboj ĉe la bord' revivas energie.
Krepuske la rajdantoj hunaj polvonubon movas,
Volante suden, norden mi direktas senkonscie.

*Du fu aludas lin mem.

**Tio signifas Yang Guifei, la plej amata konkubino de tiama imperiestro. Sxi estis mortigita laŭ la ordono de la imperiestro, kiu faris tion sub la minaco de la ribelantaj trupoj.

elĉinigi **Vejdo**



Tranoktado en Milita Tendo

Ĉe puto platano sin trovas
en frostoj sub freŝe aŭtuna ĉielo.
Mi sola tranoktas en tendo de Jiangcheng
kun flame kaduka kandelo.
Korn-sono trafendas la nokton, kvazaŭe

dirante al si mem mizere.

Zenite la luno aspektas pitoreska,
sed kiu ĝin aprecas sincere?
En longa tempdaŭro leteroj elhejmaj
neniaj atingas, neniaj.
Laŭ hejmira voj' min atendas pasejoj
dezertaj, danĝeraj, defiaj.
Dek jarojn mi migradas ,suferas tro multe
en tagoj tragikaj sennombraj.
Finfine jen kiel birdeto kaŝvivu
surbranĉe en pensoj mi sombraj.
elĉinigi **Liu Wei**



Kolora Anaso

Senkota, kolorricxa, la anaso
Suriras sxtupojn jen per pasxoj lantaj.
Dividas plumoj sin per kolorklaso,
La gxiaj sidas nigraj disde blankaj.
Atentas nek envion de sia raso
Nek miron gxi en mavaj la okuloj.
Kungxuas gxi el sama la mangx-maso,
Sed gakas ne l' unua por mastr-luloj.
Elĉinigi **Hongjia**

Mondonaco

Zhao Bingyuan ¥20
KORAN DANKON!

Eldonas Redakcio de *Penseo*
Adreso: s-anino Harpina WU
Poŝtkesto 136, Jichang-xi,
Guangzhou, Ĉinio, CN-510403
E-poŝto: harpina@21cn.com
POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!

.....

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou
Universitato, Guangdong515063, Ĉinio
Tel: (0754) 2903012 (hejme)
E-poŝto: wyd168@21cn.com
Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.
